

## & Al la Esperantisto:

< Rekante 33 el 65 batoj por strofo, entute 1300 paŝoj dum 13 minutoj. Kvar poemojn kaj unu dediĉon verkis L. L. Zamenhof (, &1 kaj , &2 en Unua Libro por Rusoj, 1887; , &3 en La Esperantisto n-ro 1, 1889; , &4 en Plena lernolibro de la tutmonda lingvo "Esperanto" por Rusoj, 1890; rekantaĵon ĉe foto pri la unua Kongreso de Esperanto en 1905). Baladigis Martin Strid (2017) per islanda melodio.

### (#Melodio:

(# A Sprengisandi: /La do La do LalTi dolTi La do; Ti mi Ti mi Tildo reldo Ti Ti; La do La do LalTi dolTi La do; Ti mi Ti mi Tildo reldo Ti Ti;

(#Rekantaĵe: mi mimi fa fafa fa fafa fa mi; re rere re dodo do dodo Ti Ti; mi mimi fa fafa fa fafa fa mi; re rere re dodo do TiTi La La a)

)×20 )+

### (& Strofoj:

#### , &1. Mia penso:

'1 /Sur la kampo, fo2r de2 l' mondo, ;  
Antaŭ nokto de2 so2mero, ; Amikino e2n  
la2 rondo ; kantas kanton pri2 l' e2spero.

(×: (Kion disigis ne unu miljaro ; Tion  
kunigis Bulonjo ĉe l' Maro ;)×2)

'2 Kaj pri vivo detruita ; Ŝi rakontas  
kompatante, - ; Mia vundo refrapita ; Min  
doloras resangante. ....

'3 "Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro, ; Kial tia  
senmoveco? ; Ha, kredeble rememoro ; El  
la kara infaneco?" .....

'4 Kion diri? Ne ploranta ; Povis esti  
parolado ; Kun fraŭlino ripozanta ; Post  
somera promenado! .....

'5 Mia penso kaj turmento, ; Kaj doloroj  
kaj esperoj! ; Kiom de mi en silento ; Al vi  
iris jam oferoj! .....

'6 Kion havis mi plej karan - ; La junecon -  
mi ploranta ; Metis mem sur la altaron ; De  
la devo ordonanta! .....

'7 Fajron sentas mi interne, ; Vivi ankaŭ mi  
deziras, - ; Io pelas min eterne, ; Se mi al  
gajuloj iras... ..

'8 Se ne plaĉas al la sorto ; Mia peno kaj  
laboro - ; Venu tuj al mi la morto, ; En  
espero - sen doloro! .....

#### , &2. Ho mia kor':

'9 Ho mia kor', ne batu maltrankvile, ; El  
mia brusto nun ne saltu for! ; Jam teni min  
ne povas mi facile ( ; Ho, mia kor'!)×2

'10 Ho mia kor'! Post longa laborado ; Ĉu  
mi ne venkos en decida hor'! ; Sufiĉe!  
trankviliĝu de l' batado, ( ; Ho, mia kor'!)×2

#### , &3. Al la "Esperantisto":

'11 En bona hor'! Ni aŭdis la signalon, ;  
Kaj bataleme saltas nia koro, ; Konduku  
nin, komencu la batalon ; Sub bona stelo,  
en feliĉa horo! .....

'12 Amikoj de proksime, malproksime, ;  
Salutas vin, ho nia luma stelo! ; Konduku  
nin senhalte kaj sentime ; Al nia granda,  
sankta, ĝlora celo! .....

'13 Ne tre facila estos nia vojo ; Kaj ne  
malmulte ankaŭ ni suferos, ; Sed batalante  
kun plej granda ĝojo ; Senhalte ni laboros  
kaj esperos. ....

'14 For estas jam la baroj de l' komenco, ;  
L' unua muro estas trarompita, ; Kaj dolĉa  
estos nia rekompenco, ; Kiam la celo estos  
alvenita! .....

#### **,&4. La Espero::**

'15 En la mondon venis nova sento, ; Tra la mondo kuras forta voko; Per flugiloj de facila vento ; Nun de loko flugu ĝi al loko.

'16 Ne al glavo sangon soifanta ; Ĝi la homan tiras familion : ; Al la mond' eterne militanta ; Ĝi promesas sanktan harmonion. ....

'17 Sub la sankta signo de l' espero ; Kolektiĝas pacaj batalantoj, ; Kaj rapide kreskas la afero ; Per laboro de la esperantoj. ....

'18 Forte staras muroj de miljaroj ; Inter la popoloj dividitaj ; Sed dissaltos la obstinaj baroj, ; Per la sankta amo disbatitaj. ....

'19 Sur neŭtrala lingva fundamento, ; Komprenante unu la alian, ; La popoloj faros en konsento ; Unu grandan rondon familian. ....

'20 Nia diligenta kolegaro ; En laboro paca ne laciĝos, ; Ĝis la bela songo de l' homaro ; Por eterna ben' efektiviĝos. .... )